

Eŭropa Bulteno

Novembro 2015, Numero 154

LABORPLANO DE EEU POR 2016



Dum la skriba kunveno de la estraro de EEU okazinta la 26-an de oktobro 2015 estis akceptita la orientiga Laborplano de EEU por la jaro 2016, kiun ni prezentas ĉi-sube. La membraro rajtas ja kontribui per rimarkoj kaj proponoj. Faru tion ĝis la fino de decembro konsiderante la realajn financajn kaj personarajn kapacitojn de EEU.

1. Ellaboro de 2-4 novaj projektoj baze de konkursoj de Europa Komisiono kaj transdono al la koncernaj fondaĵoj inter kiuj por Citizenship kaj Erasmus+, konkursoj en nova EU-programo valida de 2014-2020

2. Kunlaboro kun organizantoj de UK en Nitra por kunprepari la ĉeftemajn prelegojn pri »
Socia justeco – lingva Justeco.



3. Kunorganizado kun LKK de lingva konferenco de la Viŝegradaj landoj (CZ, HU, PL SK) kun samopiniantaj EU landoj (V4+) pri la temo „Perspektivoj de lingva komunikado en EU“, en Nitra de la 28a ĝis 29a de julio, donante helpon pri flankaj bezonoj de la konferenco kaj serĉante kvalitajn prelegantojn.

4. Serĉi kandidaton por la 11-a EEU-kongreso en 2017

5. Stimuladi kaj konkrete iniciati en minimume du EU-landoj ke ili proponu al landa ŝtata aŭ UNESCO-instanco akcepton de decido pri Esperanta kulturagado en tiu lando kiel nacia kulturheredaĵo.

6. Pluaktivi en Platformo por multlingvismo de Eŭropa Komisiono kune kun E@I.

7. Eldoni libron paperforman pri la stato de Esperanto-movado en Eŭropa Unio kiel kolekto de 28 artikoloj pri la movadoj en 28 EU-landoj, kiujn ni aperigis en Eŭropa Bulteno inter 2010 kaj 2013 kaj kreis elektronikan formon de la libro troviĝanta en nia paĝaro.

8. Organizati podian diskuton kadre de Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando) komence de septembro 2016 kaj kun aktiva partopreno en la Forumo kaj aparta atento al informa agado.

9. Partopreno de EEU-reprezentantoj en almenaŭ 5 diversaj internaciaj neesperantistaj konferencoj kiuj traktas lingvajn kaj identecajn temojn.

10. Prelegoj kaj partopreno de la estraranoj de EEU en deko da konferencoj kaj kongresoj de landaj asocioj de EEU al kiuj ili estos invititaj.

11. Kunlaboro kun la grupo de pola parlamento pri Esperanto kaj kun slovakaj instancoj pri tiusenca aktivado kadre de Viŝegradaj ŝtatoj planante daŭran aktivadon cele al fortigo de la kompreno pri kultura dimensio de eŭropaj integradaj lingvaj demando.

12. Plua klopodo serĉi vojon organizati kadre de Euroscola en Strasburgo apartan sesion por gimnazioj kun E-kursoj.

13. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Eŭropa Lingva Tago (26-a de septembro): publikaj prelegoj pri lingva stato en Eŭropo, ekspozicioj pri Esperanto, lingvaj festival(et)oj, aperigo de nacilingvaj libroj – tradukoj al malpli grandaj lingvoj...

14. Realigi kampanjon pri komuna baza lernilo por komencantoj en la retoj de chiuj LAoj baze de la eltrovita baza morfemlisto de la plej oftaj morfemoj en parole kaj skribe uzata Esperanto (esploroj de Tiŝljar, Gerard).

15. Iniciati agadojn far Landaj Asocioj okaze de Tago de Gepatraj lingvoj (21-a de februaro): Disvastigo de konkludoj de Eŭropa Platformo de Civitanasocioj por Antaŭenigo de Multlingveco, per prelegoj kaj rondaj tabloj.

16. EEU-kunlaboro kun diversaj internaciaj kaj eŭropaj Esperanto-organizoj kiel UEA, TEJO, SAT, AVE, EDE, AEK, ILEI ktp.

17. Redaktado kaj aperigado de Eŭropa Bulteno (11 numeroj sur averaĝe 12 paĝoj) en elektronika formo kaj aperigata en nia EEU-paĝaro kaj en la paĝaro de Remush (<http://remush.be/bulteno/index.html>)

18. Regula kompletigado de informoj en la retpaĝaro de EEU: www.europo.eu

19. Organizo kaj preparo de Jarasembleo dum la UK en Nitra

20. Stimuli realigon de sponsora plano: pli fortaj landaj asocioj helpu al landaj asocioj en krizo, ĉefe por kipra, malta, bulgara, rumana, estona asocioj. Fortaj landaj asocioj kiuj transprenis sponsorecon super iu el la menciitaj movadoj, devus financi restadon de 2 gejunuloj el tiuj landoj en IJK en Vroclavo, Pollando (julio 2016). Italio jam transprenis Malton, Francio Rumanion, Belgio Kipron.

LINGVO.INFO EN BERLINA LINGVOFOIRO EXPOLINGUA



Ĉiujare novembre dum du tagoj en Berlino okazas Expolingua, unu el la plej grandaj eŭropaj lingvofoiroj. Ĉi jare ĝi okazis la 18-an kaj 19-an de novembro kaj la projekto de EEU lingvo.info estis prezentita kadre de granda stando kiun oficale prizorgis E@I kaj Studio Gaus GmbH, ambaŭ partneroj en la intertempe el la vidpunkto de EU-financado finita projekto

lingvo.info. Pasintjare la tuta stando estis pagita de la projektbuĝeto de lingvo.info, ĉi jare de la aktualaj daŭrantaj projektoj de E@I kaj Studio Gaus GmbH. En ambaŭ kazoj kunlabore kun EEU la stando estis uzata por varbi ne nur pri la standon paganta projekto, sed ankaŭ por aliaj projektoj kiuj aktuale ne havas buĝeton por pagi tre multekostan standon ĉe tiu ĉi foiro. Tiel lingvo.info ĉi jare profitis de aliaj projektoj.

Dum du tagoj la foiron ĉe kiu prezentiĝis entute 144 ekspoziciantoj el 27 landoj, vizitis preskaŭ 10.000 personoj. Dum la unua tago estis senteble malpli da vizitantoj ol pasintjare, sed la duan tagon almenaŭ el la vidpunkto de nia stando estis multaj interesitaj vizitantoj al kiuj necesis prezenti la projektojn. La stando, simile kiel pasintjare, estis inter la plej belaj kaj plej profesie aspektigitaj standoj de la ekspozicio, ĉefe dank al Jevgenij Gaus kiu kunlabore kun Maja Tišljar preparis la koncepton de la stando jam pasintjare kaj aspektigis la ĉefan elementon - la standomurojn. Tiel ĉi jare nur necesis adapti la standon aldonante novajn projektojn.



Krom ekspoziciaj standoj, kiujn eblis viziti ambaŭtage tuttage, dum du tagoj de Expolingua okazis entute 85 prezentoj kaj prelegoj. Ankaŭ E@I ricevis la eblon prezentĝi per prelego "Lingvolernado en interreto - lerni lingvojn kaj interesigi pri ili" kadre de la ĉeftemo de la dua tago Reta lingvolernado. Malgraŭ la termino kiel unua matena prelego sabaton, la prelegejo estis preskaŭ plena de

interesita publiko. Prelegantoj estis Maja Tišljär kaj Katharina Friesen de Studio Gaus GmbH, kiuj prezentis ĉefe tri grandajn retprojektojn, inter ili lingvo.info. Mallonge menciita estis ankaŭ lernu.net kiel unu el la pioniraj retprojektoj por lingvolernado en la mondo.

Maja Tišljär

APELO AL LANDAJ ASOCIOJ – GRAVA NOVA CELO

Unu el la taskoj de EEU estas instigi la landajn asociojn krei realigi iujn celojn kiujn devus realigi la landaj asocioj en laŭeble multaj landoj. Unu el la plej gravaj tiusencaj taskoj post la grava atingo pasintjara en Pollando, kie oni sukcesis ofiiale listigi Esperanon inter la naciaj kulturaj heredaĵoj de tiu lando. Tiu sukceso ne havos gravan internacian kosekvencon por Esperanto, se ĝi restos nur ununura ekzemplo (simile kiel la atingo en Hungario ke Esperanto estas egalrajta femdlingvo inter la elekteblaj por akiri universitatan diplomon, kiun post jardekoj neniu alia lando kapablis ripeti, restos ununura ĝis ĝi estingiĝos). Sed la precedenco de Pollando tamen ebligas pli simplan atingon de la samaj sukcesoj en pluraj EU-landoj. Por tio ne necesas leĝo akceptata de landa parlamento. Kutime decidojn pri tio kiu kulturaĵo iĝos kultura heredaĵo de iu lando akceptas aŭ iu komitato ene de kulturministerio aŭ iu alia ministerio aŭ nacia UNESKO-komisiono.

Ankaŭ la pravigo por tion atingi estas multe pli facile klarigebla kaj argumentebla. Dum preskaŭ 130 jaroj de la ekzisto de Esperanto en preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj evoluis Esperantomovado ĉefe kiel kultura movado. En kelkaj landoj ĝi sendube estis eminenta movado kies kreantoj estas parto de ties nacia kultura produktado, sekve de nacia kultura heredaĵo. Verŝajne en ĉiuj eŭropaj landoj dum pluraj jarcentoj multaj verkistoj kaj sciencistoj verkis en la latina. Tiuj latinverkistoj sendube apartenas kaj estas agnoskataj kiel parto de la nacia kulturkreado, nacia kulturheredaĵo. Same devus esti pri kulturkreado en Esperanto. Kiam franca movado kolektos ĉion kion francaj esperantistoj kreis en Esperanto dum la tuta E-historio kaj prezentos tion al la franca institucio kiu zorgas pri nacia kultura heredaĵo, sendube tiu instanco devus esti surprizita pri la korpuso de tiu kreado kaj graveco de francoj por kunkonstrui tutmondan E-kulturon. Tute same, aŭ eble eĉ pli surprizitaj devus esti hungaraj instancoj, kompreninte kia giganto ene de E-kulturo estas hungara nacio. Inter la granduloj

sendube estas ankaŭ Skotlando kaj Hispanio kaj certagrade ĉeĥoj, nederlandanoj, maltanoj, italoj, Kroatoj, litovoj, bulgaroj, germanoj, danoj...

Tial mi apelacias al la estraroj de ĉiuj EU-aj landaj asocioj decidi laŭeble baldaŭ starti la agadon tiusenca.

1. Esplori kiu instanco en la lando decidas pri kultura nacia heredaĵo
2. Kiajn dokumentojn oni devas kolekti por starigi peton al la instanco ke la nacia kultura korpuso kreita en la lando estu agnoskita kiel nacia kulturheredaĵo, kiel parto de nacia kultura kreado
3. Transdoni tiun dokumeton kaj laŭeble lobii por la sukceso

Se Krom Pollando ni sukcesos pri tio en almenaŭ kelkaj pliaj landoj, tiam ni povus kunigi la fortojn kaj postuli simile en EU baze de tiuj oficialaj oficialigoj ene de ŝtatoj-membroj kaj poste ĉe UNESKO.

Mi scias ke tiusence iniciatoj jam estas en komenca fazo en Francio kaj Kroatio. Jen defio ankaŭ por ĉiuj aliaj niaj landaj asocioj! Ĉu mi povos raporti pri unuaj paŝoj faritaj antaŭ la UK en Nitra?

Zlatko Tišljarić

DISKRIMINACIO DE EŬROPA KOMISIONO KONTRAŬ NE-ANGLALINGVANOJ

Pli kaj pli la Eŭropa Komisiono trudas la anglan lingvon al civitanoj de diversaj EU-landoj. Ŝajnas ke ili ne scias ke 87% de EU-civitanoj parolas aliajn lingvojn denaske, ne la anglan. Ili parolas pri egaleco inter ĉiuj civitanoj, sed samtempe donas konstantan, gravan kaj ne-meritan privilegion al la 13% de denaskaj anglalingvanoj, kaj malpli grandan avantaĝon al la homoj kiuj lernis la anglan, aparte al la homoj kiuj estas sufiĉe riĉaj por pasigi multajn jarojn en anglalingva lando. Ne estas multo de justeco en tio!

Ekzemple, la Komisiono publikigis la regulojn por la programo ERASMUS+ nur en la angla unue, kaj longe poste en aliaj lingvoj. Ĝis hodiaŭ ne ekzistas ebleco koni la novan regularon de ERASMUS+ pri Strategiaj Partnerecoj, kiu ĉi-jare ŝanĝiĝis, sed pri tio povas informiĝi nur anglalingvanoj... Kaj oni jam anoncas la novan aplikan periodon! Gravas mencii, ke la Europa Komisiono malpermesas traduki la dokumentojn fare de Naciaj Agentejoj!

EEU forte rekomendas al legantoj kaj al ĉiuj landaj asocioj plendi skribe per retpoŝto al la EU-a peristo (ombudsmano). Tio eblas ĉe:

<http://www.ombudsman.europa.eu/atyourservice/secured/complaintform.faces>

Klarigojn pri tio kion oni povas fari vi trovos ĉe:

<http://www.ombudsman.europa.eu/nl/shortcuts/contacts.faces>.

Elektu dekstre supre la oficialan lingvon laŭ via deziro. Ne necesas mencii Esperanton, kaj fakte pli bonas ne mencii ĝin. Pli efikas mallonga mesaĝo, en via denaska lingvo, al la suprecitita retadreso.

Ek al skribado!

Seán Ó Riain

E@I SERĈAS VOLONTULOJN



Aktivu! Gajnu sperton!
Volontulu en la Esperanta organizo E@I! Ni havas nun unu lokon por volontul(in)o kadre de la Eŭropa Volontula Servo financiatan de Eŭropa Unio. Ni do tre urge daŭre serĉas ankoraŭ unu volontul(in)on por aliĝi al nia teamo kiu momente 3 aliaj gevolontuloj. Ekde marto 2016 pliaj 2 lokoj estos liberaj, do kontaktu nin ankaŭ kaze ke vi povus kaj volus volontuli de marto 2016.

La oferto validas por junuloj 18-30-jaraĝaj loĝantaj en Eŭropa Unio. Kovritaj vojaĝkostoj, surlokaj kostoj, bona asekuro kaj aldona poŝmono!

Pli gravas aktivemo ol via Esperanto-scipovo (kun multaj Esperantistoj ĉirkaŭ vi, vi lernos ĉe ni, same kiel pluraj volontuloj jam antaŭ vi, tre rapide). Dum 2016 atendas vin speciale multaj interesaj spertoj ĉe E@I.

Kandidatiĝu kaj aliĝu al nia teamo!

Detaloj:

<http://blogu.ikso.net/2015/10/farigxu-ecxei-volontulo-ekde-auxtuno/>

Peter Baláž

LITOVIO: GRAVA RENKOTIĜO EN LA PARLAMENTO



La 28an de oktobro 2015 vicprezidanto de la Litovia parlamento kaj samtempe prezidanto de la parlamenta komitato pri Eŭropaj aferoj Gediminas Kirkilas akceptis la prezidanton de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas. Estis interkonsentite, ke Gediminas Kirkilas kun la delegacio, kiun krome eniros unu litova lingvisto kaj unu reprezentanto de neregistaraj organizaĵoj, partoprenos la internacian lingvo-politikan konferencon “Perspektivoj de lingva komunikado en Eŭropa Unio“, okazontan

la 28-29an de julio 2016 en la Slovacia urbo Nitra, kie tiutempe okazos ankaŭ la 101a Universala Kongreso de Esperanto, en la periodo kiam Slovakio prezidos Eŭropan Union.

La konferencon organizos fakultato de mezeŭropaj studoj de Universitato de Konstanteno la Filozofo en Nitra partnere kun Instituto de hungara lingvistiko kaj finn-ugraj studoj de Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en Budapeŝto, Universitato Adam Mickiewicz en Poznań (Pollando), Universitato de Suda Bohemio en České Budějovice (Ĉeĥio) kunlabore kun Ministerio pri eksterlandaj kaj Eŭropaj aferoj de Slovakio. La konferencon kunorganizos Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj Esperantic Studies Foundation (ESF).

La konferencon partoprenos, interalie, prof. Robert Philipson (Danlando), prof. Davide Astori (Italio), prof. Francois Grin (Svislando), prof. Ulrich Ammon (Germanio), prof-ino Ina Druviete (Latvio) kaj prof. Edmund Wittbrodt (Pollando). Unu el ĉefparolantoj estos la Litovia membro de la Eŭropa Komisiono Vytenis Andriukaitis. Vytenis Andriukaitis eventuale parolos en Esperanto. Ĉi tiu konferenco estas iaspeca daŭrigo de simila konferenco, okazinta en 2006 en Bratislavo.


En la renkontiĝo temis ankaŭ pri diversaj aspektoj de helpo al la 52aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, kiuj okazos en julio 2016 en Birŝtonas, interalie, pri eventuala alta protektanto de BET-52. Estis traktita la temo de financa helpo de la Litovia ŝtato al BET-52, konkreta sumo baldaŭ estos decidota.

Gediminas Kirkilas delonge subtenas Esperanton. Ekzemple, en 2008 li, kiel ĉefministro de Litovio, estis la alta protektanto de la 1a Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en Vilno. La registaro de Litovio sub lia gvido asignis al Litova Esperanto-Asocio 150000 lidojn (pli ol 43 mil eŭrojn) por la organizado de la kongreso.

Aleksander Korĵenkov

ĜENERALA KONFERENCO DE UNESKO FINIĜIS – ZAMENHOF OMAĜOTA

La 38-a Ĝenerala Konferenco de Unesko finiĝis la 18-an de novembro post dusemajna laboro en la sidejo de la monda organizaĵo en Parizo. Kiel ruĝa fadeno tra ĝiaj diskutoj iris la 70-jariĝo de Unesko kaj la realigo de la Celaro 2030 por Daŭripova Evoluigo, sed en sia ferma parolado la Ĝenerala Direktoro s-ino Irina Bokova ne povis ne tuŝi la lastatempajn terorismajn atakojn, interalie meze de la konferenca periodo en Parizo mem: *Tiu ĉi krima perfortaĵo trafas nin ĉiujn. Ĝi atakas ĉion, kio estas plej kara al ni: libereco, homaj rajtoj, la digno de ĉiu homo, nia sento de aparteno al la unusama homaro.*



Por esperantistoj la plej ĝojiga decido de la Ĝenerala Konferenco estas la envicigo de la 100-a datreveno de la morto de L.L. Zamenhof (14-a de aprilo 2017) inter 53 datrevenoj kun kiuj Unesko estos "asociita" en la periodo 2016-2017. Propono pri tio estis farita de Pollando, kun subteno de Germanio kaj Slovakio. Temas pri plia rekono de Unesko al Zamenhof post tiu okazo de la 100-a datreveno de lia naskiĝo, kiam li estis proklamita unu el la grandaj personecoj de la homaro. (Legu pli en *Gazetaraj Komunikoj* [588](#) de 2015-09-27).

Universala Esperanto-Asocio, kiu havas oficialan statuson ĉe Unesko ekde 1954, estis reprezentita de kvar observantoj: Renée Triolle, François Lo Jacomo, Oleksandra Kovyazina kaj Nathalie So Yun Kesler. Hazarde samtage, la 5-an de novembro, kiam estis akceptita la aŭspiciado de la Zamenhof-datreveno, UEA havis tempon ĉe la budo por ne-registaraj organizaĵoj, ĉe kiu la UEA-representantoj povis disdoni informilojn kaj respondi demandojn pri Esperanto kaj la agado de UEA.
Oficiala Komunikado de UEA

GRANDAJ GERMANAJ ĴURNALOJ PRI HERZBERG

Informado kaj instruado tre gravas por la disvatigo de Esperanto kaj estas ankaŭ inter niaj ĉefaj celoj en Interkultura Centro Herzberg. Ni ĝojas, ke pluraj ĵurnalistoj kaj grandaj germanaj ĵurnaloj rimarkis nian multflankan agadon, petis intervjuojn kaj raportis pri nia laboro, niaj atingiĝoj.

Ni preparis liston de tiuj artikoloj kaj eta filmo (en la germana kaj en Esperanto), kiuj aperis en la lastaj kelkaj semajnoj, monatoj kaj disponigas ilin por legado ĉe http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=29998619

Kelkaj temoj el la artikoloj:

- Esperanto-instruado, klerigado en Herzberg
- Esperanto-biblioteko, biblioteko por blinduloj
- Herzberg am Harz kiel Esperanto-urbo: dulingvaj ŝildoj, vojmontriloj, ktp.
- historio de Esperanto
- prezentado de la lingvo, gramatiko
- agadoj de Interkultura Centro Herzberg
- intervjuo kun Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy

Zsófia Kóródy



LINGVA LEĜARO EN EU

Aperis nova libro, kies temo supozeble estas (tre) interesa por esperantistoj, eĉ se en la angla: "EU language law"

<http://www.europalawpublishing.com/EN/webshop/recently-published/0/1/80343>

KONFERENCO PRI BRICS-AJ LANDOJ EN MOSKVO

La 2an kaj 3an de novembro en Moskvo en domo de Rusia Akademio de Sciencoj okazis unua internacia scienca-praktika konferenco "Landoj de BRICS: strategio de evoluo kaj mekanismoj de interagado kaj kunlaboro en la ŝanĝiĝanta mondo". (BRICS: Brazilo, Rusio, Bharato, Ĉinio, Sudafriko)




Inter la ceteraj temoj pridiskutitaj dum la konferenco estis diskutita ebla rolo de Esperanto en BRICS-landaro. Tio okazis enkadre de sekcio "Nacia kaj civilizacia identeco de landoj de BRICS, internaciaj rilatoj kaj problemoj de interkultura komunikado". La diskuto okazis surbaze de tri faritaj prelegoj de esperantistoj: Gennadij Shilo "Ĉu la estonteco de BRICS sen la angla?", Renato Corsetti kaj Mikaelo Ĉertilov "BRICS: Grandaj kulturoj kaj iliaj bezonoj

pri komunikado", José Afonso de Sousa Camboim kaj Valentin Seguru "BRICS - problemoj de interkultura komunikado".

Krom la prelegantoj partoprenis la prezidanto de REU Svetlana Smetanina kaj la gvidanto de moskva Esperanto-asocio "MASI" Irina Gonĉarova. Entute la partoprenantoj favore rilatis al la temo. Je la nomo de Rusia Esperantista Unio estis farita propono por rezolucio de la konferenco.

La prelegoj estos publikigitaj en formo de sciencaj artikoloj kiel materialoj de la konferenco en unu el la retejoj kaj revuoj de la akademio. Indas rimarki ke dum la diskuto REU ricevis proponon flanke de la Instituto de scienca informado pri sociaj sciencoj ĉe Rusia Akademio de Scienco pri probabla kunlaboro.

Mia opinio estas ke ni nepre devas partopreni en similaj eventoj ne nur por montri sin, sed ankaŭ por trovi eventualajn kunagantojn, komunajn projektojn kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj kaj sociaj kaj ŝtataj.



Necesas daŭre serĉi eblecon de organizado de internacia konferenco de la landoj de BRICS kun oficiala partopreno de ĉiuj niaj landoj pri la temo de enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo por BRICS kun la celo instigi registarojn kaj koncernajn ministeriojn fari komunan interŝtatan projekton pri Esperanto.

Mi proponas al niaj landaj asocioj

fari komunan planon de kunagado (detalan, po-ŝtupan) kaj aktive kaj reciproke partopreni en koncerna laboro de ĉiu nia asocio.

Mikaelo Ĉertilov

Fotoj de Valentin Seguru

OSIEK-KONFERENCO EN OSIJEK, KROATIO

OSIEK, societo, kiu celas la organizadon de kulture kiel eble plej altnivelaj, liberaj kaj sencenzuraj [Internaciaj Esperanto-Konferencoj \(IEK\)](#).

Venontan jaron okazos la 27-a konferenco, denove en Kroatio, nome en Osijek, de la 16a ĝis la 22a de julio 2016, do antaŭ la UK en Nitra, Slovakio. Ĝi estas organizata de s-ino Višnja Branković.

La moto de la konferenco estas: „Landoj ĉe la vojkruciĝo“. Ĝi celas la landojn de Balkano kaj ampleksas prelegojn el relative vasta gamo, ekzemple pri geografiaj, historiaj, artaj (muzikaj, literaturaj, arkitekturaj) religiaj kaj lingvaj temoj.

Horst Vogt, Vicprezidanto de OSIEK

PRI DOGMAJ KONVINKOJ KAJ LIBERA ESPRIMADO

Pro la polemiko de lastaj tempoj ĉefe inter mi kaj Antonio del Barrio mi iom cerbumis pri pli profunda signifo de tiu polemiko. Praktike Antonio postulas (kompreneble ankaŭ multaj konsentas kun li) ke oficialaj eletitoj, reprezentantoj de iu membraro, ne rajtas esprimi siajn opiniojn, se ili kontraŭas la ideologion de tiu membraro. La ideologio ĉiam estas iu arbitra aro da ideoj kiuj klopodas solvi gravajn mondajn problemojn kaj homoj kiuj akceptas tiujn ideojn akceptas ideologion, kiu interniĝas en ilia konvinkosistemo. Tio signifas ke ili akceptas dogmon, kiun neniu rajtas kontraŭstari kaj kiu ne estas ŝanĝebla. E-ideologio estas tiu idearo de Zamnhof troviĝanta en liaj poeziaĵoj kiun ni nomas interna ideo. Ĝi esence kredigas al tiuj kiuj akceptas la esperatistecon, ke per Esperanto ni plibonigos la mondon, ke post kiam ĉiuj akceptos ĝin regos harmonio kaj paco. Kompreneble, ke tio estas tre bela idearo kaj tial multaj homoj dum 130 jaroj sindoneme agas por kontribui al tiu celo kaj po tio E-movado ja tiom longe persistas kaj pluekstas. Sen tiu dogmo – kiu por racie pensanta homo efektive estas dezirinda celo, sed neniel realisma, la movado verŝajne ne plu ekzistus nuntempe.

Sed se iu membro de la grupo komencas dubi (eksteruloj ja rajtas), li iĝas danĝera. La plukredantoj timas ke tio estas viruso de la detruo kaj kondamnas, anatemas tian personon ne volante kompreni ke neniu dogmo daŭras por ĉiam kaj ke nur dubantoj kreis progreson kaj ebligis ke la socioj evoluu al pli superaj ŝtupoj.

Eĉ la plej konservativa institucio kiu gardas sanktajn dogmojn kiel la katolika eklezio estas devigitaj de tempo al tempo akcepti renegatojn kiuj havas la povon rompi iujn malnoviĝintajn dogmojn kiuj komencis bremsi ilian evoluon, kiel ekz. la nuna Papo, kiu rompas multajn ĝisnunajn dogmojn.

Ĉu do neniuj en la E-movado sen esti punita, ekskomunikita kaj plene malagnoskita, rajtas ekdubi almenaŭ pri parto de niaj sanktaj dogmoj? Mi komprenas ke komplete negi la Zamenhofidealojn vere damaĝus la E-movadon, sed daŭre persisti pri aferoj tute nelogikaj por la tiel nomata ekstera mondo estas troigo kiu fermas nin en ĉiam pli etan grupeton, kiu vidas nenion plu krom sian neston.

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 30-an de novembro 2015

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljár, Zsófia Kóródy, Aleksander Korĵenkov, Peter Baláž, Mikaelo Ĉertilov, Maja Tišljár, Horst Vogt

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

